

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Numero 215 - Printempo 2022 - £2.50/€3



La ekstero de la 'ordinara' domo kiu kamufflis la 'Sekretan Bunkron'
vizitotan de ni dum la kongreso.

Enhavaj Elstaraĵoj - Moderna Sklaveco: Katerina
Murdarasi - Honore al Ukrainio: Girvan Makaj

Esperanto en Skotlando

Numero 215 - Aprilo 2022 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Hju Rid

Telefono: 0776655 3906

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limhoru por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: noktomezo, 30a de septembro 2022**. Oni sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston uzante la normojn de OpenOffice.org Writer aŭ de LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la normo de Word ankaŭ estos akceptataj. Se la normo aŭ la tiparo uzata por via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj. Ni preferas la x-an por plej facila komputila trakto.

Enhavo

El Katedro.....	3
Taras Shevchenko, nacia poeto de Ukrainio.....	5
La Jaro en Hajko.....	7
Kiel Ekdvidi la Signojn de Moderna Sklaveco.....	8
Amo kaj Dediĉo.....	10
Komputila Ĉifrado.....	20
Kelkaj Hazardaj Pensoj Pri Angiloj.....	28
Ĉu Esperanto havas 16 regulojn aŭ nur 2 kaj duonan regulojn?.....	32
El (apuda) Katedro.....	35
Kalendaro.....	36

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: Hju Rid

Vic-Prezidanto: Duncan Thomson

Sekretario: Peter Cleaves

Kasisto: Ed Robertson

Adreso: 17 Grange Park, Dunfermline,
KY11 8QQ

Telefono: 077 66 55 3906

Rete: <https://skotlando.org>.

El Katedro

Karaj legantoj, bonvenon al mondo reviviĝanta post la kronviroza pandemio. Mi esperas, ke vi ĉiuj, kaj viaj proksimuloj, sukcese travenis la sankrizon. Nia tutmonda komunumo ja sukcesis resti en kontakto unuj kun la aliaj pere de virtualaj metodoj, kaj eĉ per malgrandaj renkontiĝoj kie kaj kiam eblis.

La granda forto de de Esperanto estas ĝia tutmondeco. Ni alte estimas kontakton kun aliaj kulturoj kaj popoloj, kaj nun ni antaŭĝojas renkonti denove malnovajn geamikojn el aliaj landoj kaj kulturoj, la juvelo ene de la Esperanto-ideo. Se vi ĝuas konatiĝon kun novaj geamikoj kie unu komprenas la alian kiel egaluloj, jen du proponoj por via somero, ambaŭ el kiuj mi povas rekomendi el propra sperto:

A. 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (en Klaipėda, Litovio, 9a-17a de julio, 2022)

Ĉi tie vi trovos diversnivelajn kursojn, literaturajn aranĝojn, muzikajn kaj artajn vesperojn, debatojn, tradukistan kurson, seminariojn, scienc teknikajn aranĝojn, instruadon de kantoj, konkursojn, kvizojn, distrajn programerojn, ekskursojn tra bela lando,

ripozadon en naturo, diskutojn, konatiĝon kun litova kulturo, ekspoziciojn, filmojn, ludojn, kaj multon alian.

Pliaj detaloj videblas en Kalendaro ĉe la fino de tiu ĉi numero.

B. 89-a Itala Kongreso de Esperanto (en Brescia, Italio, 20a-27a de aŭgusto, 2022)

La Itala Kongreso de Esperanto estas ĉiujara kongreso de la Itala Esperanto-Federacio. Dum la kongreso atendos vin seminarioj, prelegoj kaj diskutoj, kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj, lingvaj ekzamenoj, libro-servo, koncertoj kaj teatraĵoj, ekskursoj por konatiĝi kun la mirinda kaj unika ĉirkaŭaĵo.

Eksciu pli en Kalendaro.

Tamen, aliflanke direndas, ke en la nuna momento ne ĉie en la mondo estas tiom feliĉe kaj amikece, kaj unu kongreso, kiun mi alie rekomendintus, nun ne okazos. Ĝi estus la 95-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), okazunta en Moskvo, Rusio fine de julio. Tamen, SAT decidis, ke pro la morala kaj praktika maleblo okazigi kongreson en militanta lando, la kongreso ĉi-jare ne povos okazi ĉeeste. SAT diras: “Ne al milito. Jes al paco!”. Kaj kun tio ni laŭte konsentu.

Ed Robertson

Taras Shevchenko, nacia poeto de Ukrainio

En la jaro 1989, la Scienca Akademio en Kievo esprimis la desiron de la ukrainia popolo rompi la katenojn de Sovetunio per eldono de libro memore al Taras Shevchenko, la nacia poeto de Ukrainio. Ĝi konsistis el “Zapovit” la plej konata poemo de Shevchenko, kune kun versioj de tiu poemo en la maksimuma nombro da lingvoj kiujn la eldonistoj povis kolekti. Pro tio, invitoj estis senditaj al tradukistoj en multaj landoj. Por tiuj kiuj ne komprenis la ukrainan lingvon, la eldonistoj provizis version en Esperanto. Mi estis unu el la invititoj, kaj skotgaela traduko mia estis inkludita en la libro. Irlanda amiko mia sendis version en la irlandgaela, kaj aperis tradukoj en lingvoj de la tuta Sovetunio, de preskaŭ tuta Eŭropo, Asio kaj Afriko, kaj eĉ de amerikaj indiĝenoj. En 1991, Ukrainio ricevis sendependecon, kiu nun, en la jaro 2022, estas brutale invadita de la rusa diktatoro Putin.

Taras Hryhorovych Shevchenko (1814 - 1861) estis la plej renoma ukraina poeto de la 19-a jarcento, kaj grava gvidanto de la ukraina nacia reviviĝo. Jen la esperanta versio de lia poemo “Zapovit” (Testamento):

LA TESTAMENTO

Post la mort' min enterigu

En patrujo kara

Meze de la stepo vasta

Sur tumul' miljara.

Tiam Dnipron krutabordan,

Kampojn la fekundajn

Povus vidi mi kaj aŭdi

Ondojn dum inundoj.

Kiam pelos el Ukrainio

For en bluan maron

Dnipro sangon malamikan –

Kampojn kaj montaron –

Ĉion, ĉion mi forlasos

Kaj al dio flugos

Arde preĝi ... sed ĝis tiam

Mi ne konas dion.

Enterigu, vin kunligu,

Ĉenojn nun disŝiru,

Bonvenigu la liberon –

Al bataloj iru.

Kaj en granda familio,

nova kaj libera,
ne forgesu rememori
min per vort' sincera.

Esperanta versio de Nadir Andrianova-Gordienko. Per
ĉi tiu modesta kontribuaĵo, mi provos fari honoron al la
heroa ukraina popolo.

Garbhan MacAoidh (Girvan McKay)

La Jaro en Hajko

La duvizaĝa Januaro rigardas neĝflokojn belajn.	Nun Februaro surfeneŝtre debutas kun frostaj fingroj.	Marto kaj Vento marŝas tra la ĝardeno. Gardu vin, Narcis'!
Aprilo ĝojas. Abel' kaj papilio ĝuas la sunon.	Surprizo por Maj' blanka neĝo sur heĝoj! Ho! Kratagfloroj!	Juno, somera novedzino; ŝi dancas inter arbaroj.
Juli' kaj August' ĝojas vidi aliajn, kiuj ripozas.	Septembro portas fruktojn en plena jupo. Bonvenon rikolt'!	Oktobro buntajn foliojn disvastigas en la arbaro.
Morna Novembro. vualiĝas en nebul'; dorme evitu!	Decembro gaja manĝas kaŝtanojn ĉefajr' dum kristnaska fest.	Jen kiel estis. Nun klimato ŝanĝiĝas. Future kiel?

Maire McKay

Kiel Ekdvidi la Signojn de Moderna Sklaveco

Malgraŭ tio ke ĝi estas kontraŭleĝa en preskaŭ ĉiu lando de la mondo, bedaŭrinde sklaveco ja ekzistas kaj eĉ kreskas. Kiam mi estis adoleskanto, mi memoras kampanjon kontraŭ moderna sklaveco kiu nomiĝis “A21”, ĉar oni taksis ke estis 21 milionoj da sklavoj en la mondo en tiu tempo. Nun la cifero estas 40 milionoj.

Mi mem, kiel tradukisto, renkontis multe da homoj kiu eskapis de sklaveco. Kelkaj suferis nur dum semajnoj, aliaj dum monatoj aŭ jaroj. La plej juna estis nur 15 jaraĝa. Preskaŭ ĉiuj estis traŭmatizitaj de siaj spertoj.

Ajna homo povas fariĝi sklavo, sed pli ofte la sklavigistoj celas nesekurajn homojn. Tiuj kiuj estas malriĉaj, neplenaĝaj, aŭ fuĝantaj de milito, persekuto aŭ perfortaj rilatoj. Kelkfoje la viktimoj estas senhejmaj aŭ ne rajtas loĝi en la lando. Kelkaj sklavoj estas enkarcerigitaj kaj nevideblaj, en bordelo kaj fabrikoj de kanabo, sed multe da sklavoj estas klare videblaj – se oni scipovus kiel identigi ilin.

En Britio, sklavoj ofte laboras en unĝolakejoj aŭ aŭtopurigejoj, aŭ iras de loko al loko oferantaj

laboretojn ekzemple purigon de domaj parkumejoj aŭ io simila. Sed oni devas konsideri ke homoj en tre multaj okupoj povas esti sklavigitaj.

La plej oftaj signoj kiuj sugestas ke iu estas nelibera estas:

- La homo ŝajnas nerva kaj ne volas babili nek rigardi la aliajn en la okulojn.
- Liaj/ŝiaj vestaĵoj estas malpuraj aŭ li/ŝi ne havas la taŭgan vestaĵon por la laboro.
- Li/ŝi povas havi vundojn kiuj ne recevis taŭgan zorgon.
- Ŝajnas ke la homo ne konas la najbaraĵon aŭ la lokan lingvon. Povas esti ke aliaj homoj transportas lin/ŝin al la laborloko, eble en nenormalaj horoj.
- Oni devas pagi iun alian por la laboro de la homo, aŭ la homo tuj donas la pagojn al iu alia.
- La homo ne havas poŝtelefonon nek identiga-dokumentojn.

Neniuj el tiuj ŝajnoj pravas ke la homo estas sklavigita, sed ili estas sugestaj. Se oni suspektas ke iu povas esti sklavo, oni devas ne paroli pri tio kun la homo mem, ĉar ĉi tio povas endanĝerigi la homon.

Anstataŭe, oni devas kontakti la Modernsklavecan Helptelefonnumeron (Modern Slavery Helpline) kiu esploros la aferon. La numero estas **0800 012 1700**.

La alia maniero kiel oni povas kontraŭstari sklavecon estas per sia monujo. Oni povas aĉeti “Fairtrade” varojn (kiuj estas aĉetitaj de la produktistoj kontraŭ ĝusta prezo) kaj eviti tiujn kiuj pli ofte uzas sklavecon en la provizo-ĉeno. En Britio la aferoj kiuj havas la plej grandan eblecon enhavi sklavecon en siaj produktaĵoj estas komputiloj, poŝtelefonoj kaj vestaĵoj (kaj kanabo, oni supozas, malgraŭ tio ke ni ne havas multan informon pri tiu industrio). Marmanĝaĵoj, ĉokolado kaj floroj ankaŭ povas esti produktitaj de sklavo.

Por eviti aĉeti varojn faritajn per sklavlaboro, oni povas aĉeti renovigitan poŝtelefonojn kaj ne rapide forjeti siajn teknologiajn posedaĵojn, sed ripari ilin. Oni povas aĉeti uzitajn vestaĵojn, aŭ aĉeti ilin pli malofte kaj pli malmulte, sed de pli alta kvalito. Agi tiel bonas ne nur por homoj kiuj estas endanĝerigitaj de sklaveco sed ankaŭ por la medio.

Se oni deziras pli da informo pri moderna sklaveco kaj kiel ĝin kontraŭstari, oni povas viziti la retpaĝojn de Nevidita (Unseen - <https://www.unseenuk.org/>) aŭ

Kontraŭsklaveco Internacia (Anti-Slavery International - <https://www.antislavery.org/slavery-today/modern-slavery/>). Ankaŭ, se iu ajn en Glasgovo volus senpagan trejnseŝion pri moderna sklaveco por sia grupo aŭ organizo, bonvolu kontakti Restaŭru Glasgovon (Restore Glasgow - <https://m.facebook.com/RestoreGlasgow/>, joyrestore18@gmail.com).

Katerina Murdarasi

Amo kaj Dediĉo

‘Ŝi akceptindas.’

‘Akceptindas? Ŝi estas nekredebla.’

‘Ŝi ŝatas vin.’

‘Ne moku.’

‘Ni testu?’

Riko ridis. Johano aludis al ilia elimina testo, per proceduro de.

‘Ne. Lasu.’

‘Vi timas.’

‘Ne.’

‘Nu, estas ĉiuokaze mia aĉetvico. Vi ne havas

elekton. Donu al mi vian glason.’

Riko donis sian bierglason, kaj Johano, por eviti la dancantojn en la ĉambrocentro, iris ĉirkaŭ la ĉambro al la trinkservejo. Li teksumis sin inter grupoj de viroj, brakoj krucitaj, kiuj staris apudmure rigardantaj la dancejon, ĉiu kun bierglaso en unu mano subportata de la angulo de la alia kubuto. Riko rigardis la blondulinon, babilantan dum ŝi dancis. Se ŝi rigardus, sciante ke Johano ne ĉeestas, ne estus Johano kiun ŝi ŝatas – per proceduro de elimino. Li rigardis ŝin feliĉe rideti kaj ridi kun la amikino. Tiam li vidis ŝin rigardi liadirekten, kaj poste returni sin al la amikino. Sekundojn poste ŝi rigardis rekte al li, kun trankvila aspekto je la vizaĝo. Merdo! Ridetu nun, li pensis. Merdo! Li devigis sin streĉi la lipojn. Ŝi reagis tuj, per larĝa rideto, kiu montris ŝiajn perfekte blankajn, perfekte belegajn dentojn. Ŝi tenis lian rigardon, ankoraŭ ridetanta. Li deturnis la okulojn.

Johano revenis post minutoj.

‘Kiu pravis?’

‘Enordo.’

‘Diru.’

‘Vi pravis.’

‘Ne. Diru: “Johano pravis. Johano ĉiam pravas”!’

Riko levis brovon.

‘Ni dancu?’ diris Johano.

Ili metis la bierojn sur tablon kaj iris al la du knabinoj. La blondulino vidis ilin veni, kaj parolis al la amikino. Kiam ili alvenis la amikino turnis sin al Johano – en la momento kiam la muziko haltis. Damne! Tio ĉi estas embarasa.

‘Ĉu vi volus la sekvan?’ diri Riko al la blondulino.

‘Kompreneble,’ ŝi diris ridetante.

La diskestro, ĝene, perdis la lokon. Li balbutis sence dum li serĉis la sekvan trakon. La maloportuna erareto ŝajnis etendiĝi en minutojn. Riko turnis sin al la knabino kaj ridetis. Ŝi ridetis al li.

‘Kio estas via nomo?’

‘Sophie,’ ŝi diris.

La akĉento ŝajnis franca. Li sentis eksciteton pro la maniero per kiu ŝi plilongigis la duan silabon de sia nomo. Tiam, bezonante helpon, li ekrigardis flanken, sed Johano estis jam ĉe la trinkservejo kun la amikino de Sophie, kaj aĉetis por ŝi trinkon.

‘Mi estas Riko. Tiu estas Johano.’

‘Tiu estas Angela.’

‘Angela.’

Ili daŭre ridetis. Li ne volis diri, ĉar ĝi estis tiel kliŝa, sed li ne povis pensi ion alian por diri. ‘Kiel vi okupas vin?’ kaj la dolĉa konversacio komenciĝis. Des pli dolĉa ĉar ŝi ne montris kian ajn deziron esti aliloke, kaj ŝajnis tute kontenta stari apud li. Ŝi diris ke ŝi estas studento de la angla el Marseilles. Ŝi instruas en la lernejo Lawside. Ŝi aĝas je dudek unu. Ŝi tre ŝatas la lernantojn sed miris ke ilia kapablo en la franca estas malforta.

La muziko rekomenciĝis kaj ili dancis du dancojn. Je la fino de la dua li havis ŝian numeron.

Riko jam laboris por Organek dum ses monatoj kiam li renkontis Sophie. Li estis jam feliĉa tiun vesperon eĉ antaŭ la plia feliĉo kiun ŝi alportis. Lia estro, pli frue en la tago, proponis al li ekscitan novan projekton: produktindeca studo pri forgesitaj produktoj. Li vokis Rikon en sian oficejon, kaj diris ke la kompanio estas tre kontenta pri lia laboratoria laboro, eĉ pli pri lia kompreno pri teoretiko de drogoj kaj ties aplikoj. La estroj volas ke li gvidu malgrandan propran projekton.

‘Jen aro de raportoj kaj laboratoria taglibro. Ili

apartenis al Vilĉjo Simington, kiu emeritiĝis antaŭ pluraj jaroj,' diris la estro, 'Ili subtenadis ekde tiam bretan polvon, sed ni opinias ke eble oro troviĝis ene.'

Li donis al Riko ringobindilon kaj nigran kartonkovritan notlibron.

'Vilĉjo kolektis raportojn pri drogoj super kiuj li laboris dum la jaroj, tiuj kiuj neniam atingis merkaton. La plejmulto ne havis komercan valoron, sed oni jam plene testis ilin. Ili ĝenerale estas sendanĝeraj; iajn flankefikojn oni notis en la raportoj.'

'Kiel oni permesis lin testi nevendeblajn drogojn?'

'Ha! Tiaj tagoj estis aliaj, Riko. Ni posedis pli grandajn buĝetojn, kaj organulojn, kiaj Vilĉjo, oni regis pli libere ol hodiaŭ. Sed li laboris konscience kaj faris provojn laŭ modernaj kriterioj; li insistis pri p-valoro je komo nulo nulo unu.'

'Kiaj estis tiuj ĉi drogoj? Kiaj efikoj?'

'Hm, mi pensu. Nu, estis unu,' kaj li ridis, 'Fideipidem, mi opinias, kiu kuracas ateismon. Nenia vendebleco por tia hodiaŭ!'

'Ĉu vere?'

'Mi kredas ke jes – nenia kalemburo – ĝi liveras al homoj kredemon. Nu, ĉu interesas vin la projekteto?'

‘Jes. Kompreneble.’

‘Enorde. Ni serĉas kion ajn. Patologio multe progresis ekde la tagoj de Vilĉjo; iuj el tiuj drogoj povus esti utilaj nun; esploru kombinojn; esploru mildigajn efikoj je hodiaŭaj drogoj; kaj pensu preter malsano. Vi komprenas, sendube. Kaj se vi ja trovos ion, via kariero en Organek akceliĝos.’

Riko daŭre ridetis dum li kuŝis en la lito la vesperon post la renkonto kun Sophie. Ĉi-foje, mi petas, pensis li. Neniaj pliaj seniluziiĝoj. Mi petas, ho Dio. Li krucosignis sin kaj komencis preĝojn. Unu Patro Nia, unu Ave Maria, kaj unu Gloro Al. Tiuj tri, kaj silenta konversacio posta, estadis rutino ekde infanaĝo. Li preĝis al kaj kredis pri Dio. Li kredis, jes, li kredis. Li sekvis fidele la instruojn de la Eklezio. Por li, ili estis tiel memevidentaj. Ekde akcepto de la vereco de la Evangelioj, la tuta cetero sekvas. Sed estis precize tiuj ĉi instruoj kiuj malfermis faŭlton ĉagrenigan en lia vivo. Kiel trovi kredeman virinon. La patro sukcesis, kompreneble, kaj la pli aĝaj gefratoj. Almenaŭ trovi, virinon tian, kiu ankaŭ allogis lin. Tio gravis, ĉu ne? Iun kun kiu li povus paroli. Kara Jezuo, iun kun kiu li povus paroli.

Li preĝadis ĉi-teme kiam li komencis universitatajn studojn, sed la preĝoj ne estis sukcesaj ĝis nun. Tiu doloriga fakto kaŭzis al li scivoli ĉu li ricevas deĉielan mesaĝon. Ĉu Dio gvidas lin en iom timigan direkton? Ĉu li devas fariĝi pastro? Li efektive ne malŝatus pastran karieron. Li povus imagi sin en la okupo. Celebrado de Meso. Vizitoj al paroĥanoj. Aŭdado de konfeso. Li ĝuus prediki kaj babili kun homoj. Sed fraŭleco, ĉu vere, Dio? Ĉu tion vi ja deziras? Ĉu tiel – manko de taŭga virino – alvokiĝo montras sin?

Nu, li atakis tiun demandon. Li jam aranĝis kaj morgaŭ li vizitos la episkopon. Sed ĉi-vespere li renkontis Sophie. Nekredebla, amorinda, inteligenta. Li posedis ŝian numeron kaj, damne jes, li telefonos ŝin. Sed li sciis ne esperi tro frue. Do, mi petas, Dio, neniam pliaj seniluziigoj. En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Sankta Spirito. Amen.

Riko sidis en la salono de la domo de la episkopo, atendante kafon kiun tiu portos. Li scivolis kial, entute, li faris tiun ĉi aranĝon. Plaĉas al li virinoj; li havis koramikinojn. Tamen, neniu, ĝis nun, estis edzinigindaj, almenaŭ ne laŭ liaj kriterioj, ne ĝis hieraŭ.

‘Jen, via kafo,’ diris Episkopo Stefano Galloway kaj metis tason kun subtaso sur la tablon antaŭ Riko. ‘Diru al mi pri vi mem; via laboro, via vivo, amikoj, kaj tiel plu, kion pensadis vi. Hodiaŭ ni nur babilas, kompreneble; neniuj decidoj, absolute neniuj.’

Do Riko parolis pri si mem. Finfine li eldiris. Li ankoraŭ ne renkontis la virinon de siaj revoj. Ĉiuj koramikinoj de la universitataj tagoj estis militemaj ateistoj; la virinoj kiujn li renkontis en la paroĥo estis, ni honestu, seninteresaj.

‘Do, pri via laboro?’ diris la Episkopo.

‘Mi ĝuas ĝin; ĝi estas fascina. Sed, mi pensas ke mi ŝatus labori pli kun homoj ol kun drogoj; mi ne certas.’

‘Pastreco certe donus tion al vi. Sed ankaŭ aliaj alvokiĝoj donus.’

‘Sed pastreco estas speciala.’

‘Vere. Ĝi havas gloron. Ĉu tio allogas? Tio ne estas malbona, kompreneble, sed la laboro enhavas multon sengloran. Nu, ĉiuokaze, ĉu vi havas koramikinon nun?’

‘Ne,’ diris Riko. Tio veris laŭdetale, sed li sentis la orelojn bruliĝi.

‘Ĉu vi preĝas al Nia Sinjorino?’

‘Unu Ave vespere.’

‘Ĉu vi povus rosarion?’

‘Ja, kompreneble.’

‘Enorde. Ni lasu aferojn tiel dum, ni diru, ses monatoj? Daŭru en via laboro kvazaŭ vi intencas resti en ĝi. Se vi renkontus iun inan, nur sekvu vian instinkton; ne permesu ke tiu ĉi konversacio ŝanĝu kion ajn. Nur estu vi mem; kaj mi vidos vin post ses monatoj!’

Sophie kaj Riko fariĝadis paro. Li telefonis al ŝi tuj post la renkonto kun la episkopo, kaj pardonpetis ke, voki ŝin la sekvan tagon ŝajnigis lin tro entuziasma. Sed ŝi ĝojis.

‘Mi ne kredas tiel,’ ŝi diris, ‘Plaĉas al mi montri kion oni sentas. Kial homoj ludu ion, ian ludon?’

Ŝi parolis en bona sed ne perfekta angla. Riko ridetis feliĉe. Ŝi misprononcis la anglan “th”. Riko sentis plaĉan ĝuon pro ŝia provo. Li daŭris ridete, tutsola en sia apartamento, dum li babiladis en blindan telefonaparaton. Finfine li petis ŝin.

‘Ĉu plaĉus al vi akompani min al la kinejo ĉi-vespere?’

‘Jes, kompreneble, tre plaĉus.’

Ili intervidadis unu la alian ne tre longe antaŭ ol frapis senluziigo. Sophie ne estis kredanto.

‘Mi lernis ĝin en la lernejo, tiun ĉi religion,’ ŝi diris. Ili sidis en la sofo en lia apartamento, man-en-mane, proksimaj unu al la alia. ‘Sed ĝi ne havas sencon por mi. Miaj gepatroj, vidu, estas ambaŭ sciencistoj. Mi lernas de ili ke religio ne estas racia.’

‘Mi scias, mi scias. Sed ĝi havas sencon por mi. Se vi kredas la Biblion, ĝi enhavas sencon.’

‘Mi ne kredas la Biblion. Mi ne povas. Ĉu vi ĉesos ŝati min?’

‘Ho ne! Mi ankoraŭ ŝatas vin. Ho, jes, kompreneble. Mi ŝatas vin tre multe, tre tre multe.’

Li ne mensogis. Sophie estis revo. Li ne povus deziri ion plian en virino, krom kredemo. Li plene konsciis ke lia insistado venis de la Eklezio. Sed la Eklezio malstreĉiĝis iomete ekde Vatikano II. Oni permesus miksitajn geedziĝojn pli facile nun. Tamen, tiu ĉi ĉikaneto, tiu ĉi sento de malperfekto, tiu ĉi sablero en la okulo. Kial estas ĉiam tiel?

La projekto en Organek fascinis lin. Li havis liberon larĝigi siajn esplorojn preter kuraco de malsanoj kaj kovris multajn drogoklasojn. La tasko estis grandega sed li frue adoptis metodologion kiu helpis lin progresi tra la granda kolekto de drogo de Vilĉjo Simington dum samtempe reteni spuron de eblecoj. Li esploris uzojn matene kiam la menso estis pli lerta, kaj legis la dosieron de Simington en la posttagmezo.

Unu posttagmezon, kvar monatojn post la jam forgesita vizito al la Episkopo, li revenis al la fabriko post libera mateno kaj lunĉo kun Sophie en apuda kafejo. Tiun tagon okazis lerneja ferio, kaj ŝi havis libertempon. Kiam ili forlasis la kafejon ŝi kisis lin milde sur la lipojn, kio kaŭzis al li ke reiro al laboro fariĝis la lasta afero kiun li volis fari.

La malfermis la ringobindilon je la loko kiun, oscedema, li markis hieraŭ. La titolo de la registro tuj saltis en lian atenton.

SCN: 93647/5

Nomo: FIDEIPIDEM

Klaso: Hipnotilo

Efiko(j): Induktas kaj/aŭ aktivigas spiritan kredemon

Efikopovo: 50% de subjektoj raportas malaperon de

antaŭaj obstakloj pri kredo rilate supernaturajn fenomenojn ene de 12 horoj de dono. Ceteraj raportas nenian rimarkeblan efikon.

Daŭro: Ene de periodo de homaj eksperimentoj (13 monatoj) ĉiuj pozitivaj volontuloj retenis efikon sen rimarkebla redukto. Negativaj subjektoj raportas nenian ŝanĝiĝon.

Sekureco: neniaj raportitaj flankefikoj.

Mekanismo: Necerta je tempo de esploro.
Supozate: anatomie specifa neŭrotransdonilo.

Postlabore tiun vesperon Riko kaj Johano portis bierojn en kvietan angulon de la trinkejo Speedwell, kaj sidiĝis.

‘Ĉu vi feke frenezas?’ diris Johano, ‘Kio se oni priserĉis vin?’

‘Oni ne. Nur pri narkotaĵoj, sed neniam pri la drogoj de Simington.’

‘Vi tamen estas idioto. Ĉu scias Sophie?’

‘Ankoraŭ ne, sed mi diros al ŝi.’

‘Diable certe vi diros. Se mi iam malkovris ke vi

subdonis ĝin al ŝi, mi frakasmus vian damnindan nazon.’

‘Trankviliĝu, Johano! Kion vi pensas pri mi?’

‘Okej, okej, okej.’

‘Tio ĉi gravas al mi. Se ĝi efikus, estus pli facile edziĝi kun ŝi. Mi deziras edzinigi ŝin; ŝi estas perfekta.’

‘Perfekta krom tio ke ŝi ne kredas pri la katolika Eklezio.’

‘Ne, ŝi ne kredas. Vidu, ĝi estas familia situacio. Ili ĉiuj geedziĝis kun katolikanoj. Ĉiuj.’

‘Kaj vi deziras edzinigi ŝin?’

‘Jes.’

Sophie tenis la malgrandan kapsulon inter polekso kaj fingro. Ŝi rigardis al Riko super la mano. Ŝi ridetis.

‘Tiu ĉi igos min kredi?’

‘Ŝanco po kvindek el cento.’

‘Kaj ĝi sendanĝeras?’

‘Cent centone.’

‘Kaj vi ŝatos min pli se mi kredos?’

‘Ho, Sophie, mi ne povus pli ŝati vin. Mi plene enamiĝis al vi.’

Ŝi klinis sin kaj kisis liajn lipojn.

‘Mi ankaŭ plene enamiĝis kun vi.’

‘Vi ne devas preni ĝin. Mi ne petis vin. Mi nur diris al vi, kion raportis la dosiero.’

‘Kaj se mi ne prenos, ĉu vi ankoraŭ amos min?’

‘Mi ne povus ne ami vin.’

‘Kaj se ĝi ne efikos?’

‘Mi ankoraŭ amos vin same.’

‘Do kial?’

‘Kial? Ĉar estus pli facile, pli facile en nia ... pli facile se vi venus kun mi al la preĝejo, nur tio.’

‘Hej, drogo ne povas fari tion ĉi,’ diris Sophie, kaj ŝi ĵetis la kapsulon en sian buŝon. Ŝi levis glason al la lipoj, kaj tralavis la kapsulon per ruĝa vino.

La sekva tago estis Dimanĉo kaj, dum Riko pretigis sin por piediri al Meso dek-unu-hora, la pordosonorilo bruis. Jen Sophie. Ŝi surportis sian plej bonan grizan jupon, kremkoloran bluzon, kaj bluan jakon. Sur ŝiaj liopoj estis leĝera rozkolora ŝminko, ne tro evidenta,

sed sufiĉa por ne aspekti malformala. Ŝi ridetis al Riko.

‘Mi venas ankaŭ.’

‘Ho, mi ĝojas! Du minutojn, kaj mi pretos.’

Kapoj turniĝis en la romkatolika preĝejo Sankta Josefo je la Meso dek-unu-hora kiam Riko okupis seĝon fiere akompanata de Sophie. Ili sidis proksime unu al la alia tutdume, kaj li helpis ŝin pri la respondoj per indiko al la loko en lia meslibro. Li ne povis ne fojfoje rigardi ŝin, ŝian belan vizaĝon, vere ĉeestantan dum la Meso kun li. Ŝi ridetis al li ĉiun fojon.

‘Ĉu vi fariĝos mia edzino?’ li diris kiam li senrubigis la tablon post lunĉo.

Ŝi ekploris.

‘Mi pardonpetas. Ĉu mi eraris demandi? Ĉu tro frue? Estas tro frue.’

‘Ne, ne, ne. Ne estas tro frue. Jes, mi diras jes.’

‘Ho, dank’ al Dio. Dank’ al. Sed kial larmoj?’

‘Mi timis ke vi ne petos al mi.’

‘Sed vi sciis ke mi petos. Mi amas vin.’

‘Tio estis antaŭe, antaŭ ĉi tiu drogo. Ĝi efikis. Mi

kredas nun. Mi kredas je Dio, kaj hieraŭ mi ne kredis. Hieraŭ mi opiniis ke kredo estas senracia kaj hodiaŭ mi kredas. Ĉi-matene, en la Meso, mi feliĉis. Mi estas nun feliĉa. Mi feliĉas kredi. Sed mi ne povas ne kredi. Mi ne pensas ke mi plu povus esti kiel mi estadis. Kaj mi tiom timas esti ĉi tiel sen vi.'

Li stariĝis kaj iris ĉirkaŭ la tablo al ŝi. Ŝi stariĝis por renkonti lin. Ili brakumis kaj kisis malrapide.

En la vespero li akompanis Sophie-on al ŝia apartamento kaj poste promenis hejmen. Li dankis Dion kaj la Virgulinon pro la miraklo. Tio ĉi devas esti ties respondo al la multaj jaroj da preĝado kaj la ĵusaj monatoj de sindediĉo al Maria, per la ĉiutagaj rosarioj. Li nun havis la virinon de siaj revoj, kaj ili geedziĝos. Li enspiris profunde kaj suspiris.

Kaj tiam, je la fino de la suspiro, li sentis la etan ĉikanan, hontigan, dubeton, sen kialo, neklarigeblan, nur etan difektan jukon.

Hju Rid

Komputila Ĉifrado

1 Enkonduko: La Cezara Ĉifro

Ĉifrado ekzistis dum jarmiloj: la unua ĉifro kiun infanoj renkontiĝas estas la Cezara ĉifro uzata (laŭdire) de la romiaj imperiestroj por komuniki kun siaj generaloj: oni skribas la abocon, kaj sub ĝi la abocon denove, sed movita, jen adaptita al la esperanta aboco:

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U Ŭ V Z
K L M N O P R S Ŝ T U Ŭ V Z A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ

Tiel oni povas ĉifri (kaj malĉifri) ian ajn vorton aŭ frazon, ekzemple:

G K B Ĥ H D Ĉ

Tamen ĉi tie ni iom lernos pri kiel komputiloj ĉifras datenojn, kaj – dumvoje – lernos iom pri kiel komputiloj pritraktas informojn. Sed antaŭ ol fari tion, ni devas ekkompreni kial la Cezara ĉifro estas malbona.

Por la esperanta aboco (kun 28 literoj) ni povas formi la Cezaran ĉifron kiel supre, per movo de duono de la aboco – per 14 lokoj. La unua problemo estas, ke se ni ĉiam uzas la saman 14-lokan movon, la ĉifro fariĝas simplega ‘rompi’.

Iomete pli bona solvo estus movi ĝin per sekreta distanco, kaj tiun distancon oni sekrete kaj antaŭe ‘flustru’ al la ricevonto. Tio permesas 27 eblajn ‘ŝlosilojn’, de 1–27. Se la supra ekzemplo uzas la ŝlosilon ‘14’, la suba anstataŭe uzas la ŝlosilon ‘5’:

VĤPŬĤAT

(deĉifru mem!)

Tamen ankaŭ ĉi tio ne estas kontentiga solvo, ĉar oni povas uzi la teĥnikojn de *ĉifroanalizo* por ‘rompi’ la ĉifron. Kun ĉi-speca ĉifro, la plej utila teĥniko estas uzo de literofteca tabelo por la celata lingvo. En esperanta teksto, ekzemple, la litero ‘A’ ĝenerale estas la plej ofta, kaj sekvas ĝin la vokaloj ‘I’, ‘E’ kaj ‘O’, kaj poste ‘N’.

Kun sufiĉe longa teksto oni povas nombri la oftecon de literoj en la ĉifroteksto, kaj rapide eltrovi kiun ŝlosilon oni uzas. Ĉi tio eĉ rapide eblas nur mane, sen la helpo de komputilo – kun komputilo estas eĉ pli rapide.

Pli sekura metodo uzi tiujn ‘anstataŭigajn’ ĉifrojn estas elekti vorton (aŭ eĉ frazon) kiel la ŝlosilon, kaj ŝovi la abocon per ĉiu litero en la ŝlosilo, ekzemple, ‘ŜLOSI’:

ABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ K LMNOPRSŜTUŬVZ
 1 Ŝ TUŬVZABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ K LMNOPRS
 2 LMNOPRSŜTUŬVZABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ K
 3 OPRSŜTUŬVZABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ K LMN
 4 SŜTUŬVZABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ K LMNOPR
 5 I J Ĵ K LMNOPRSŜTUŬVZABCĈDEFGĜĤĤ

Oni poste ĉifru la unuan (kaj sesan, dekunan)
 literon per la unua linio, la duan (kaj sepan, . . .) per
 la dua linio, kaj tiel plu, ekzemple:

ĴCB KMĜIĤS

Tamen ankaŭ tiujn mesaĝojn oni povas ĉifroanalizi,
 se oni havas sufiĉan tempon – aŭ komputilon!

Efektive la ĉifromaŝinoj, kiujn oni uzis dum la dua
 mondmilito (ekzemple la fama ENIGMA), uzis ion
 similan al ĉi tiu metodo. Tamen la ENIGMA estis iom
 pli komplika, ĉar la ŝoviĝo de la aboco por unuopa
 litero dependis ne nur de la ŝlosilo (la komenc-punkto
 de la maŝino) sed ankaŭ de la antaŭe ĉifrita mesaĝo:
 jen vera ‘enigmo’, kaj nur solvebla helpe de la unuaj
 inventitaj komputiloj.

La plej sekura metodo uzi ĉi tian ĉifron estas uzi tiel
 nomatan ‘unufojan ŝlosilegon’: ŝlosilteksto kiu estas
 same longa kiel la sendata teksto, tiel ke oni neniam

ripetas la ŝlosilon ene de unu mesaĝo. Tamen oni devas trovi metodon sekrete komuniki tiun longan ŝlosilon al la ricevonto. . .

Krom cifroj kun rektaj anstataŭado de literoj, oni ankaŭ povas inventi (aŭ imagi) alian metodon: *miksado* de literoj. Kompreneble la ordo kaj kombino de literoj en mesaĝo gravas, kaj se oni povas ankaŭ ŝanĝi tion, oni povas eĉ pli bone kaŝi la mesaĝon. Sed fari tion sen helpo de komputilo estas malfacile. Se oni volas (ekzemple) mikscifri du literojn kune, estas entute $28 \times 28 = 784$ eblaj kombinoj. Imagu kiom tede estus nur fari tion, sen paroli pri mikso de pli ol du samtempe!

2 Komputiloj kaj Bitoj

Ni nun konsideru kiel uzi tiujn ideojn ene de komputilo.

Ene de komputiloj, ĉio reprezentigas per bitoj: tio estas, pere de du simboloj, kutime prezentitaj kiel nul ('0') kaj unu ('1'). Per tiuj du ciferoj, oni povas reprezenti iujn ajn numerojn en duuma formo, ekzemple:

Dekume	Duume			
	8	4	2	1
1				1
2			1	0
3			1	1
4		1	0	0
5		1	0	1
6		1	1	0
7		1	1	1
8	1	0	0	0
9	1	0	0	1
10	1	0	1	0
11	1	0	1	1

. . . kaj tiel plu!

La programojn de la komputilo, kaj ĉiujn datenojn, kiujn ĝi pritraktas (ĉu numerojn, tekston, sonojn, bildojn, retpaĝojn – eĉ filmojn) oni povas reprezenti per numeroj, kaj tiel, per tiuj du bazaj simboloj.

Ĉi tie ni ne konsideros ĉiujn datenspecojn, sed limigos nin al nur teksto. Supozu, ke ni volas reprezenti la esperantan abocon en komputilo, kiom

da bitoj ni bezonos por ĉiu litero? Nu – estas 28 literoj, kaj per kvin bitoj ni povas nombri de 0 ĝis la duuma numero 11111, kiu estas $16 + 8 + 4 + 2 + 1 = 31$, do kvin bitoj sufiĉos, kaj eĉ permesos al ni havi kelkajn plusajn lokojn ekzemple por spaco, aŭ interpunkcio. Sube ni uzas tiujn lokojn por la kvar kromaj latinaj literoj (Q, W, X, Y) en siaj ‘kutimaj’ lokoj:

A	00000	Ĝ	01000	M	10000	T	11000
B	00001	H	01001	N	10001	U	11001
C	00010	Ĥ	01010	O	10010	Ŭ	11010
Ĉ	00011	I	01011	P	10011	V	11011
D	00100	J	01100	Q	10100	W	11100
E	00101	Ĵ	01101	R	10101	X	11101
F	00110	K	01110	S	10110	Y	11110
G	00111	L	01111	Ŝ	10111	Z	11111

Ni nun konsideru kiel ĉifri ene de komputilo?

3 Disaŭ

Ne — tio ne estas mistajpo!

Ene de komputiloj oni kombinas tiujn nulojn kaj unuojn per la tiel nomataj ‘logikaj’ operacioj. Estas pluraj el ili, sed ĉi tie ni uzos nur unu, la disaŭ operacio.

En ĉiutaga uzo, la vorto ‘aŭ’ havas (logike) du signifojn:

- la signifon kiu permesas ambaŭ — la **kajaŭ** (‘ĉu vi volas lakton aŭ sukeron en via teo?’)
- la signifon kiu postulas elekton — la **disaŭ** (‘ĉu vi volas teon aŭ kafon?’).

Por tiuj logikaj operacioj oni havas simbolojn – por la disaŭ operacio ni uzas \oplus . Se ni kombinas du bitojn A kaj B per la \oplus operacio por havi $A \oplus B$, tiu rezulto estas 1 nur se A aŭ B (sed ne ambaŭ, ĉar temas pri disaŭ) estas 1, jene:

A	B	$A \oplus B$
0	0	0
0	1	1
1	0	1
1	1	0

Ĉi tio donas al ni tre facilan metodon ĉifri datenon en komputilo. Supozu, ke ni havas ian fontan datenon, ekzemple la bitojn por la vorto ‘SALUTON’ jam vidite.

Ni nun povas uzi ŝlosilon, kiu povas esti iu ajn bitaro, kaj logike 'disaŭ'-i nian fontdatenon kun ĝi, donante ĉifraĵon. Ekzemple, se nia ŝlosilo estus la litero 'Q' (1 0 1 0 0) (ripetite ĝis la fino de la mesaĝo):

	S	A	L	U	T	O	N
	1 0 1 1	0 0 0 0	0 1 1 1	1 1 0 0	1 1 0 0	1 0 0 1	1 0 0 0
	0	0	1	1	0	0	1
\oplus	1 0 1 0	1 0 1 0	1 0 1 0	1 0 1 0	1 0 1 0	1 0 1 0	1 0 1 0
	0	0	0	0	0	0	0
	0 0 0 1	1 0 1 0	1 1 0 1	0 1 1 0	0 1 1 0	0 0 1 1	0 0 1 0
	0	0	1	1	0	0	1
	C	Q	V	Ĵ	J	F	E

Sed nenio postulas, ke nia ŝlosilo estu 5-bita, aŭ eĉ ke ĝia longo estu dividebla de 5. Ekzemple, ni povus uzi la ŝlosilon: 001001000011:

	S	A	L	U	T	O	N
	1 0 1 1	0 0 0 0	0 1 1 1	1 1 0 0	1 1 0 0	1 0 0 1	1 0 0 0
	0	0	1	1	0	0	1
\oplus	0 0 1 0	1 0 0 0	1 1 0 0	0 0 1 0	0 0 1 1	0 1 0 0	0 0 0 0

0	0	1	0	0	1	1
1 0 0 1	1 0 0 0	1 0 1 1	1 1 1 0	1 1 1 1	1 1 0 1	1 0 0 0
0	0	0	1	0	1	0
O	M	S	X	Y	V	M

Rimarku nun ke kaj A kaj N ĉifriĝas kiel M, ĉar la ŝlosilo ne estas la sama por ĉiu litero. Efektive, ni liberiĝis de la ideo de literoj, ĉar nia fontodatenoj, kaj nia ŝlosilo, ambaŭ estas simple bitoj en la komputilo!

La plej sekura ‘anstataŭiga’ ĉifro, same kiel eksterkomputile, estus unufoja ŝlosilego same longa kiel la fontodatenoj — sed kun la sama problemoj!

4 Miksado

Ĝis nun ni nur konsideris la anstataŭigon de bitoj, sed ankaŭ eblas miksi la bitojn. La plej simpla estas simple interŝanĝo de bitoj, tamen ekzistas aliaj ebloj. Se ni havas paron de bitoj – ni povas interŝanĝi ilin aŭ ne, depende de ‘ŝlosila’ bito. Kiel tre simpla ekzemplo, konsideru la unuajn du literojn de la fontmesaĝo, ‘SA’, kaj ni uzu la ŝlosilon ‘Q’ (1 0 1 0 0) denove. Ni parigas ĉiujn bitojn, kaj interŝanĝas ilin kiam la ŝlosilo estas 1, sed ne se la ŝlosilo estas 0:

		S				A			
1	0	1	1	0	0	0	0	0	0
	×			×					
0	1	1	1	0	0	0	0	0	0
		K				A			

Eĉ pli bona ol simpla interŝanĝo estas kiam oni vere kune miksas la bitojn, tiel ke unuopoj bitoj en ĉifraĵo dependas ne nur de unu bito en la fonto, sed de pluraj. Denove, ekzemplo. Se ni havas du bitojn, A kaj B, kaj ŝlosila bito, S, ni povas produkti ĉifrajn bitojn A' kaj B' , kiuj estas:

- $A' = A$, kaj $B' = A \oplus B$, se $S = 0$


- $A' = A \oplus B$, kaj $B' = B$, se $S = 1$

(oni poste povas facile rehavi la originalojn konante la ŝlosilon: se $S = 0$, $A = A'$, kaj $B = B' \oplus A'$; se $S = 1$, $A = A' \oplus B'$ kaj $B = B'$) Miksado kutime ne estas unupaŝa: oni povas havi plurajn etapojn, kiuj pli plene miksas grupon de bitoj, sub rego de la bitoj en pli longa ŝlosilo.

5 Kunmeto kaj (Provizora) Konkludo

Ni nun havas eblon transformi grupon de bitoj per du metodoj: anstataŭigo per disaŭo kun ŝlosilaj bitoj; kaj kunmiksado per pli da ŝlosilaj bitoj. Per tiuj du

operacioj, oni povas konstrui ĉifran sistemon, kiu akceptas du aferojn: blokojn de bitoj de la fonta dateno, kaj aron de ŝlosilaj bitoj, kiuj regas la funkcion de anstataŭigaj aŭ miksaĵaj etapo. Por rehavi la originalan mesaĝon, iu posedanta la ŝlosilon povas inversigi la procedon.



Do oni 'nur' devas aranĝi, ke la ŝlosilo estas havebla ankaŭ al la ricevanto de la mesaĝo. Nur unu problemo: se oni havas sekuran metodon sendi tion al la ricevonto, kial oni ne simple uzas tion por sendi la mesaĝon?

En venonta artikolo ni ekzamenos kiel solvi tiun problemon!

Duncan Thomson

Kelkaj Hazardaj Pensoj Pri Angiloj

Dum la lastaj monatoj, multfoje okazis ke mi hazarde trovis artikolojn aŭ afiŝojn pri angiloj. Kaj mi subite notis, ke mi apenaŭ sciis ion ajn pri angiloj. Pro tio, mi volis sciigi min mem, kaj per tio, ankaŭ sciigi aliulojn.

La unua afiŝo, kiun mi trovis, temas pri angiloj je mia devena graflando, Somerset. Laŭ la artikolo¹, la muzikemaj festintoj spertis tiom da drogoj, ke post libera urinado tiaj drogoj estis trovitaj en la riveroj. La drogoj diluiĝas en la riveroj, je niveloj kiuj ankoraŭ povas damaĝi la angilojn. Mi scias, ke festemuloj tiaj estas stereotipo ankaŭ drogemuloj, sed mi neniam imagus ke ili tiel influis la ĉirkaŭan medion.

Flanke, mi memoras ceteran artikolon pri influo de ne-naturaĵoj en Somerset-aj riveroj. Mi supozas, ke influo de oranĝsuko “Sunny D” ankaŭ ne bonas por angiloj².

Sciinte tion, mi volis lerni pli pri kie loĝas angiloj. Ili loĝas en nesala akvo (riveroj ktp), escepte dum bredado, kiam ili moviĝas ĝis sala akvo. Tiaj fiŝoj, kies

1 <https://www.theguardian.com/music/2021/sep/28/glastonbury-drug-traces-from-on-site-urination-could-harm-rare-eels>

2 <https://www.bridgwatermercury.co.uk/news/1070776.gerber-rapped-for-yellow-river/>

migrado estas salakven por bredado, nomiĝas katadromoj. Salmoj estas ekzemplo de fiŝo, kiu male migras (anadromoj). Kompreneble, minacoj kontraŭ salmoj estas ankaŭ minacoj kontraŭ angiloj. La plej videbla minaco estas digo³. Haltado de akvo en artefaritaj lagoj per muregoj ankaŭ haltas la movadojn de fiŝoj. Pli ofte nun, 'fiŝ-stuparoj' estas konstruitaj, por ebligi la migradon de fiŝoj.

La migrado de angiloj estas al Sargasmaro. Sargasmaro estas regiono de la norda Atlantiko, kies limoj estas la marfluo, kiuj formas la nordatlantikan marrondiron. Ĉar tiu maro ne havas terajn limojn, la limoj, do, ne estas difinitaj. Sargasmaro estas la nura ekzemplo de tia maro surtere. La nura insularo ene de la maro estas la insuloj Bermudoj.

Simile, angilaj korpoj estas nekutimaj. Mankas al angiloj kelkaj naĝiloj, kaj la dorsa kaj anusa naĝilo estas unuopo kun la vosta naĝilo. La tri naĝiloj kune iĝas unu longa naĝilo ĉirkaŭ la angilo.


Same kiel ranoj kaj papilioj, angiloj faras metamorfozon⁴. Ili naskas de ovoj larvoforme. Angilidoj havas kelkajn apartajn formojn post larvo. Unue, ili kreskas kiel vitraj angilidoj, poste kiel

3 <https://phys.org/news/2021-12-million-years-earth-decline-endangered.html>

4 <https://en.wikipedia.org/wiki/Eel#/media/File:Eel-life-circle1.svg>

pigmentohavaj (e/ver angle), pli poste flavaj angilidoj, kaj finfine iĝas plenkreskaj arĝentaj angiloj. Migrado ensalakven (por bredado) okazas kiam angiloj estas plenkreskaj. La mala migrado (al riveroj) estas farita de vitraj angilidoj.

Kelkaj angiloj, ekzemple morenoj havas du makzelojn. La unua, pli granda, makzelo estas uzata por mordi predon. La faringa makzelo, ene de la unua, estas ege movebla, kaj moviĝas antaŭen, tenas la predon, movas ĝin al la gorĝo, kie la moreno povas gluti ĝin. Tiel, la moreno aspektas kiel la 'ksenomorfo'⁵ en la filmo "Alien".




Unu el la plej konataj strangaĵoj pri angiloj estas la kapablo produkti elektron. Tiaj angiloj, la tiel nomataj

5 [https://eo.wikipedia.org/wiki/Alien_\(esta%C4%B5o\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Alien_(esta%C4%B5o))

6 https://en.wikipedia.org/wiki/Pharyngeal_jaw#/media/File:Pharyngeal_jaws_of_moray_eels.svg

elektraj angiloj, fakte ne estas veraj angiloj. Ĝustnome, ili estas gimnotoj aŭ tranĉilfiŝoj. La rilato inter gimnotoj kaj katfiŝoj estas pli proksima ol al angiloj. Okdek pro cento de la korpo de gimnoto estas la organoj por krei elektron. La organoj enhavas elektrajn ĉelojn, en longaj linioj. Tiu formo eble estis inspiro por baterioj. La linio ebligas, ke kurento trafluas, kaj ke tensio kreskas (malrapide, paralele). Kiam la gimnoto uzas ĝian elektron, fluo de natrio tra ĉelmuroj ŝanĝas la ŝarĝon, kreinte kurenton, kiu elfluas (tuje, serie) el la organoj.



Ekzistas tvitera konto, kiu sekvas la elektroŝokojn de gimnoto en Tenesio, Usono. Ĉiam, kiam la gimnoto (nomita Miguel) produktas sufiĉe grandan ŝokon, la konto tuje pepas!⁸

Angiloj ankaŭ estas manĝataj. Japanio manĝas sepdek pro cento de ĉiuj angiloj en la mondo⁹. La angiloj estas kreskigataj de homoj, sed ni ne kapablas

7 https://en.wikipedia.org/wiki/File:Electric_organisms.png

8 <https://twitter.com/EelectricMiguel>

9 https://en.wikipedia.org/wiki/Eel_as_food

bredi angilojn. Vitraj angiloj devas esti kaptitaj.

La angiloj estas kuirataj per lerta kuiristoj sur kradrostiloj¹⁰. En Britio, oni tradicie pli ofte manĝis pigmentajn angilidojn, aŭ manĝis angilojn en supo kiu iĝis gelatenaĵo. Manĝante *e/ver*, oni manĝas la tutan korpon, same kiel fiŝidojn. En Gloucester, okazis konkurso pri rapida manĝado de pindo da pigmentaj! Pro la minaco kontraŭ angiloj, ne plu estas sufiĉe da lokaj angiloj, do la konkurso ne plu uzas verajn angilojn¹¹. Gloucester klare emas al strangaj konkursoj, ĉar tie ankaŭ estas la fromaĝ-rula konkurso (kie partoprenantoj rapide malgrimpas deklivon, ĉasante fromaĝon).

Historie, ankaŭ manĝitaj estis marpetromizoj. Tiu fiŝo estas kvazaŭ angilo, sed same kiel gimnoto, ne estas vera angilo. La vivciklo de marpetromizoj estas mala ol de angiloj (ili estas anadromoj, kiel salmoj). Marpetromizoj havas multajn dentojn (sed nenian makzelon), kaj manĝas viandon kaj sangon. Likvo, produktita en la buŝo de marpetromizo, haltas koaguladon. Pro tio, ili nomiĝas vampirfiŝo. Henry I de Anglio emis manĝi marpetromizojn, kaj lia morto eble estis pro tromanĝado de ili.

10 https://www.youtube.com/watch?v=k4URGc_3FrE

11 <https://discoverseafood.uk/fishing-through-time/the-return-of-the-elvers/>

Estis notinda ke la sango de angiloj estas venena, pro proteino kiu kaŭzas korinfarktojn. Tiu proteino estas detruita per kuirado.

Mi nun sentas ke mi pli scias pri angiloj. Mi esperas ke vi ankaŭ sentas tiel. Finverkinte tiun ĉi artikolon, mi ĝuegis japanan manĝon, inkluzive de bongusta suŝio kun angilo.

Peter Cleaves

Ĉu Esperanto havas 16 regulojn aŭ nur 2 kaj duonan regulojn?

Legu atente kion skribis Zamenhof mem¹²:

“Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj.

Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.

¹² Zamenhof, Unua libro de la lingvo Esperanto en Fundamenta Krestomatio, 12-a eldono, paĝo 248

Tiel ekzemple la devenon de la vorto “fratino”, kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj: frat (frato), in (virino), o (kio estas, ekzistas) – (kio estas frato-virino = fratino) – la lernolibro klarigas en la sekvanta maniero: frato = frat; sed ĉar ĉiu substantivo en la nominativo finiĝas per “o” – sekve frat’o; por la formado de la sekso virina de tiu sama ideo, oni enmetas la vorteton “in”; sekve fratino—frat’in’o; kaj la signetoj estas skribataj tial, ĉar la gramatiko postulas ilian metadon inter la apartaj konsistaj partoj de la vortoj.

En tia maniero la dismembriĝo de la lingvo neniom embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto. Kaj tamen la rezultato de tiu ĉi konstruo de la lingvo estas tia, ke ĉion, kion vi skribos en la lingvo internacia, tuj kaj kun plena precizeco (per ŝlosilo aŭ eĉ sen ĝi) komprenos ĉiu, kiu ne sole ne ellernis antaŭe la gramatikon de la lingvo, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝia ekzistado.”

Ne multaj atentis pri ĉi tiu teksto de Zamenhof, sed, leginte ĝin, se vi legos la Fundamenton de Esperanto, kaj la 16 regulojn kaj la ekzercaron, vi povos konkludi, ke multaj el la tiel nomataj reguloj estas nur listo de vortoj, pronomoj, numeroj, prepozicioj, ktp.

La veraj reguloj, kiujn vi povas eltiri el la Fundamento restas nur du aŭ eble du kaj duono kaj la strukturo de Esperanto estas tute fremda al la eŭropaj popoloj, laŭ la esprimo de Zamenhof. Por ke eŭropanoj ne timu, li ne aparte emfazis tion, sed nun post 135 jaroj oni rajtas paroli pri tio.

La originala lingvo de Zamenhof estas tiom originala, ke nur nelingvisto kun granda intuicio povis krei ĝin, ĉar ĝi havas nur du ĉefajn regulojn:

1-a.

Ĉiu vorto devas baze finiĝi per vokalo: *o, a, e, [i/as/is/os/us/u]*, al kiuj povas aldoniĝi aliaj literoj por la pluralo kaj la akuzativo. Sed tiuj vokaloj diras la precizan signifon kaj la funkcion en la frazo de la vorto. Ekzistas nur fermita nombro da vortoj, kiuj funkcias en la frazo ankaŭ sen finaĵo [pronomoj, numeroj, table-vortoj, prepozicioj, konjunkcioj, kelkaj adverboj]

2-a.

En la frazo en Esperanto ĉio devas esti kunligita al la verbo, rekonebla pro sia finaĵo, per aparta kunligilo, tio estas per adverba finaĵo, e, per akuzativa finaĵo, n, aŭ per prepozicio [*per, kun, en*ktp.]. La sola parto de la frazo, kiu ne bezonas apartan kunligilon estas la subjekto

Ni provu apliki la regulon al la unua frazo de Zamenhof en la ĉi-supra teksto kaj ni vidos, ke ĝi validas:

Mi [=subjekto sen aparta finaĵo] aranĝIS (plenaN dismembriĝoN) (DE la ideoj) (EN memstarajn vortojn), tiel ke la tuta lingvo, (ANSTATAŬ vortoj) (EN diversaj gramatikaj formoj), konsistAS sole nur (EL senŝanĝaj vortoj).

2-a kaj duono.

Ĉi tiu regulo poste eltrovita de Renee Saussure ne estas akceptata de ĉiuj gramatikistoj, sed ĝi certe ekzistas: en vortoj la finaĵoj havas apartan valoron sed ankaŭ la nuda radiko havas iun kernan signifon de aĵo, kvalito aŭ ago, kiun oni respektu en la pluformado de vortoj.

Temas pri la konata problemo de komb-i, kerne verbo ankaŭ sen -i, kiu iĝas kombilo, dum bros-o,

kerne sustantivo, neniam fariĝas brosililo.

La cetero estas nur vortoj kaj kunmetado de vortoj.

Renato Corsetti

El (apuda) Katedro

Por kuraĝigi homojn sekvi la konsilon de la unua Katedrokupanto rekomenci Esperantumi ĉe kongresoj, mi volas raporteti pri la Brita Kongreso de Esperanto okazinta en Conwy, Kimrio la 22-an ĝis la 24-a de aprilo. Malpli granda ol antaŭaj, eble pro daŭraj timoj pri Krovimo, ĝi tamen estis amikema kaj ĝuinda. La du ĉefprezentantoj – Hans Becklin kaj Stela Besenyei-Merger – faris interesajn kaj pensigajn prelegojn, pri la juna Zamenhof kaj la fenomeno ‘Bobelarto’ respektive. Stela ankaŭ gvidis ‘Legosalonojn’ dum kiuj partoprenantoj, laŭ libera vico, laŭtlegis el nove eldonitaj verkoj lerte tradukitaj en Esperanton. Plej ĝuinda el tiuj estis la ĉerpaĵo el ‘La Kurioza Incidento de la Hundo en la Nokto’ de Mark Haddon; la pensmaniero de la aŭtisma ĉefrolulo – Kristoforo – estis prezentita tiel ke oni ne povis ne laŭte ridi plurfoje je ĉiu paĝo.

La plej alta punkto de la semajnfino estis la Bankedo en luksa Hotelo ‘The Quays’ apud la Boathaveno de Deganwy kun bonkvalitaj manĝaĵoj kaj bela kompanio. Maldekstre sidis Marteno Taylor, profesia magiisto, kiu distris ĉiun tablon per ĉiam lertaj kaj ankaŭ ridigaj magiaj trukoj. Dekstre sidis Nina Pietuchowska, la

ĉefpreleganto de nia propra kongreso en 2018. Estis ĝoje rerekonti ŝin, sed malĝojige aŭdi de ŝi pri la afliktoj de la Ukrainaj rifuĝintoj en ŝia urbo, Bjalistoko, en orienta Pollando.

Estas malfacile, ŝi diris, instrui al adoleskoj kiuj perfekte komprenas la rusan sed rifuzas paroli ĝin pro memevidentaj kialoj. Doloris aŭdi pri la malfaciloj de la rifuĝintoj plenigantaj oficialajn formularojn, kiuj postulas evidencon de loĝloko, geedziĝa stato, identigaj dokumentoj, ktp, kiam ĉio ĉi estis forlasita en bombita aŭ bombota domo dum panika teruro pri sia propra vivodaŭro. Sed tiuj homoj estis almenaŭ en sekura lando.

Plej doloris malkovri al ŝi ke nia registaro postulas la samajn neplenumebajn evidencojn – de homoj ankoraŭ ne envenintaj en nian landon.

Hju Rid

Kalendaro

27an ĝis 29a de majo 2022

La Skota Kongreso de Esperanto okazos en la hotelo 'City', Dunfermline. Kontrolu ĉe <https://skotlando.org/> por anoncoj pri programo ktp.

9an ĝis 17a de julio, 2022

56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Klaipėda, Litovio. www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56; www.sezonoj.ru/2021/08/bet-99/

20an ĝis 27a de aŭgusto, 2022

89-a Itala Kongreso de Esperanto en Brescia, Italio. Kontrolu ĉe <https://kongreso.esperanto.it/89/>

6an ĝis 13a de aŭgusto, 2022

Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo, Kanado. Informo en la angla troviĝas ĉi tie <https://esperanto2022.ca/en/world-esperanto-congress/>, kaj en Esperanto ĉi tie <https://uea.org/kongresoj>.



